Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucureşti (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtĉekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura red.: Zanoni.

ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komerco“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu **ne** per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komerco“ senpage por ET-abonantoj.

Prezo de unu numero por la landoj kun kolonioj:

Argent. 0.15 Peso	Ĉeĥosl. 1.20 Kr.	Germana 600 Mk.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.60 Esk.
Aŭstra 1500 Kr.	Estona —	(Abonu nur ĉe	Latva —	Rumana 4 Leoj
Belga 0.65 Fk.	Finna 1 20 Fmk.	poŝtoficejo)	Litova 30 Cd.	Rusa 300 Gmk.
Brazila 0.400 Mr.	Franca 0.60 Fk.	Itala 0 60 Lir.	Nederl. 0.15 Hfl.	Sveda 0.24 Kr.
Brita 3½ Pc.	Hispana 0.30 Pes.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Svisa 0.30 Fk.
Bulgara 4 Levoj	Hungara 100 Kr.	Jugosl. 3 Din.	Pola 1000 Mk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Nenomitaj landoj pagu provizore egalvaloron de 0.20 sv. fk. aŭ 0.04 Dol.

Por **Adresŝanĝoj** ni kalkulas du numerojn de la -- -- -- -- -- abonkonto. -- -- -- -- --
Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj.
Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento.
Por „Internacia Komerco“ kaj specialaj numeroj - -- -- -- - speciala prezo. - -- -- -- --

2550 kongresanoj
jam aliĝis al la XV-a;
? ? ? ĉu vi ? ? ?
jam troviĝas inter ili?

N-o 132 :-: Antwerpen, Barcelona, Bucureşti, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 15. IV. 23.

Generalo Gavanescul,
eminenta protektanto de Esperanto.

Esperanto-tago en Timiŝoara (Rumanlando).

Nia lingvo en la rolo de socia edukilo.

Ĉarman Esp. tagon sukcesoriĉan havis la 4-an de marto la Esperantistaro de Timiŝoara (Rumanlando, Banato). Plivastigante la kadrojn de la kutima kursfina ekzameno publika, oni aranĝis propagandan kunvenon kaj teatran prezentadon. La antaŭtagmeza kunveno en la kunsidejo de la urbodomo, partoprenita de gastoj el la urboj Arad, Bucureşti, Caransebeş kaj Cluj, havas specialan gravecon pro tio, ke ĝin prezidis s-o *generalo Gavanescul*, komand. de div., nobla viro senlace klopodanta por la interfratiĝo de l' nacioj malpacantaj. Kreinte jam en Timiŝoara societon **„Infratirea“ (=kunfratiĝo)** por harmonie kunigi la diversgentan loĝantaron, nun kun ĝojo li alprenis Esperanton, la potencan ilon por la alta celo. Liaj varme esprimitaj sentoj pri nia afero igu nin esperi pri benplenaj sekvoj de lia agado, de nun jam Esperantista. — En la kunveno rumane prelegis s-o Prof. *Cornea* (Cluj) pri la filologia valoro de Esperanto, komparante ĝin precipe kun la latinidaj lingvoj, efike propagandparoladis rumane kaj germane s-o *Henriko Fischer*, L. K.-ano kaj direktanto de Esp. Centro Rumana (Bucureşti), en Esperanto s-o *T. Morariu* (Cluj) kaj hungare pastro *A. Ĉe* (Bucureşti).

La posttagmeza publika ekzameno prezidita de la Ekzamena Komisiono de Esp. Centro Rumana: s-oj H. Fischer, L. K.-ano, Prof. Gh. Cornea (dejoranta ĉe la Reg. Direktejo de la Duagrada Instruado en Transsilvanio) kaj pastro A. Ĉe, — prezentis valorajn spertojn por la edukistoj. Lernintoj diversaĝaj, diversklasaj, en frapante flua kaj bela Esperanto donis la respondojn, elokvente laŭdante per tio la bravan majstron, s-on F. Hügel, vicdel. de UEA, propagandisto kun admirinda energio kaj sindono. Esp. Centro Rumana plezure premiis la plej bonajn lernintojn per la novaj eldonaĵoj de Hirt, kaj fine pastro A. Ĉe uzis la okazon por klarigi al la kunvenintaj gepatroj la gravecon de la Esp. instruado kiel edukilo logika kaj morala, resumante la rezultojn de la konferenco ĝeneva.

Post serioza laboro sekvis la gaja vespero kun programo zorge elektita. Multe ravis arta kanto de profesorino *Dalma Tötössy*, citra ludo de virtuozo, s-o *Csermák*, kanto de la nova ĥoro gvidata de s-o *Leviczky*, deklamo de s-o *P. Dinda* kaj propraj poemoj de s-o *L. Bálint*. Ĉefaj punktoj estis nepre la majstraj deklamoj de aktoro, s-o *L. Löcsey* (gasto el Cluj), sur kies lipoj sorĉe sonoris tradukaĵoj el la poemaroj de la grandaj rumanaj poetoj Alexandri, Eminescu kaj Goga, kaj la admirataj poemoj de niaj Kalocsay kaj Baghy. Ĉarmega momento estis, kiam s-o Löcsey ekdeklamis la belegan poemon de Kalocsay: „Ludo de l' sonoriloj“ kaj subite eksonis por vespera preĝo la sonorilaro de la katedralo proksima, donanta ravigan akompanon al la majstra deklamo. Post lerta prezento de „Consilium Facultatis“, en kiu pleje eminentis s-o *E. Tyroler* kaj bonege ludis ges-anoj R.za Fischer, Rozalio Wagner, F. Kiss, L. Bálint, A. Weitzen, Katinjo Kiss kaj J. Csapó, sekvis festmanĝo kun gaja kunesto en atmosfero malfalse Esperantista, ĝis horo malfrua.

La modesteco de sinjoroj *Steg*, inspektoro *M. Simu*, hon. prez. de Esp. grupo, advokato D-ro *J. Németh*, prez., subkolonelo *R. Schembra* kaj *F. Hügel* ne kondamnu la raportanton, provokitan al laŭda cito, per movado tiom vigla kaj bonege organizita.

La publikigo de tiu ĉi raporto malfruiĝis, ĉar ni ne povis sufiĉe frue ricevi la portreto-kliŝaĵon de generalo Gavanescul, pro striko en la kliŝofabriko.

La ideo pri internacia lingvo.

(Okaze de l' reveno de la mortotago de D-ro Zamenhof, 14. aprilo.)

Kiel nuntempe, tiel ankaŭ en antikva tempo — dum malproksimaj barbaraj tagoj de popolaj translokiĝoj kaj oftaj interbataloj — la lingva malsimileco inter translokiĝintoj kaj enlanduloj, venkintoj kaj venkitoj estis la plej granda malfeliĉo por ili kaj unu el la kialoj de senbezona malamo, kaŭzanta malutilajn militojn kaj minacanta ekstermon de la homa gento. Ni memorigu la kelkcentjaran, grandegan translokiĝon de la eŭropanaj praavoj el Azio en Eŭropon, de hebreoj el Egipta en Palestinan landon, nuntempe de eŭropanoj kaj azianoj en Amerikon. Ĉe tia intermiksiĝo de popoloj diverslingvaj oni sentas akre la bezonon de internacia interkomprenilo — komuna lingvo.

La antikvaj popoloj, kredante je neestiĝo de tiu ideo kaj, sub influo de forte disvolvita religia sento, komprenante la diverslingvecon kiel dian punon, iom post iom — eble dum jarcentoj — kreis la legendon pri »Turo Babela«.

„Estis tempo,“ rakontas la legendo, „kiam en la mondo oni parolis unu saman lingvon. Interkonsento kaj feliĉo regis en la homa socio. Konsiderante la disiĝon kiel malfeliĉon, la homoj decidis konstrui unu altegan turon, kiu atingu ĝis la ĉielo kaj estu videbla signo, ĉirkaŭ kiu oni devus loĝi kaj ne foriri malproksimen. Sed tiu homa intenco estis kontraŭ dia volo, kiu malsimiligis la lingvon de la homoj, kiam ili konstruadis la turon. Tiumaniere la konstruantoj ne povis kompreni unu la alian, ĉesigis la laboron kaj disiris sur la tutan terglobon.“

En la legendo estas simbolismo. La turo atingonta ĝis la ĉielo signifas la animan unuiĝon inter la anoj de l' homa socio kaj la potencon, kiun atingus la homaro havante unu komunan lingvon. Malsimiligo de la lingvo kaj disiro signifas komencon de pereigaj translokiĝoj kaj militoj.

Tiu legendo estas la plej malnova kaj belega saĝoverko en la antikva historio kaj esprimas la plej fortan deziron kaj revon de la popolaro turmentata pro la ekzistanta diverslingveco. Ĝi esprimas la deziron de ĉiuj popoloj, pro tio ĝi estas unika, havante internacian signifon, kaj ni ge-Esperantistoj — militantoj por la plenumo de l' revo de nia praavaro — ŝatas kaj plenprave metas ĝin en la komencon de nia „Historio de Internacia Lingvo“.

Sed tamen la legendo ne kontentigas nin. Kial en ĝi ne estas montrita la vojo, laŭ kiu oni devus iri por solvi la problemon pri komuna lingvo? Oni povas facile respondi. La tiamaj popoloj militantaj ofte inter si, kun maloftaj aŭ preskaŭ neniaj interrilatoj kaj malgranda kulturo, ne povis sukcese montri tiun vojon, do devigis la malfeliĉan postidaron, kiu estus pli saĝa, mem fari tion.

En la nova tempo la komerco, industrio, interpopolaj komunikoj, transporto, scienco, literaturo, ktp. disvolviĝis ĝis maksimumo ne atingita ĝis nun. En tiu tempo fariĝis grava afero: iom post iom kreiĝis internacia terminologio, necesa fundamento por internacia vortaro. Nun la demando, kiu aperis jam en antikva tempo, fariĝis urĝa sur la scenejo de l' vivo kaj atendis sian solvon. Post kelkaj pli fruaj, ne sukcesintaj provoj por akcepto de nacia lingvo kiel internacia, estas faritaj centoj da provoj por artefarita lingvo de scienculoj-homamantoj, sed nia Majstro estis la unua, kiu ĝuste sukcesis solvi la problemon.

Internacia lingvo estas kreita. La homaro estas elkondukita el la mallumo kaj savita.

D. Grekov.

La verda stelo en la liberŝtato Danzig.

Iom strange do estas: el Danzig oni jam delonge nenion aŭdis. Ĉu eble Esperanto tie dormas? Certe ne, la afero estas tute alia. Esperanto vivas! En Danzig ekzistas ne nur la Danziga Esp. Asocio (samtempe loka grupo), sed ankaŭ diversaj Esp. grupoj kaj solaj membroj en jenaj lokoj de la liberŝtato: Langfuhr, Oliva, Zoppot, Praust, Hohenstein, Tiegenhof, Kalthof, Wossitz k. a.

Grandega stelo sur la ĉefperono de l' stacidomo Danzig anoncas, ke Esperantistoj diligente laboras por Esperanto. Du konstantaj Esp. afiŝoj estas en la stacidomo, same en la Langfuhr'a. La verdan stelon oni trovas ankaŭ sur la du telegramtabuloj (publika afiŝo de la Esp. grupoj).

La ora fingroringo.

De Gustavo-Adolfo Bekér.

I.

Ŝi estis mirinde bela. Ŝia beleco nebuligis la kapon kaj ŝajnis nesurtera, anĝela. Sed tio est's diabla ĉarmo, per kiu la Tentanto iufoje donacas teran estaĵon, por fari ĝin sia ilo. Li amis ŝin per la tuta pasio, ne konanta bridojn kaj barojn, en kiu oni serĉas ĝuojn kaj trovas nur turmentojn. Tio estis amo bruliga kiel feliĉo kaj malgraŭ tio ĉi pleniganta la ĉielan kupolon kvazaŭ per liberigo de peko.

Ŝi estis kaprica kaj ekstravaganta kiel ĉiuj virinoj en la mondo.

Li — superstiĉa kaj kuraĝa, kiel ĉiuj viroj de lia tempo.

Oni nomis ŝin Mario Antuacs, lin — Pedro-Alfonso de Orejana.

Ambaŭ ili estis toledanoj kaj loĝis en sia gepatra urbo.

La legendo pri tiu ĉi mirinda epizodo, okazinta antaŭ jarcentoj, limiĝas per mallonga skizo de siaj herooj, kaj mi en rolo de senpartia kronikisto, ne aldonos eĉ unu vorton, por ilin priskribi pli bele.

II.

Li trovis ŝin foje ploranta kaj demandis: „Pri kio vi ploras?“ Viŝinte la okulojn, ŝi fikse ekrigardis lin kaj daŭrigis ploregi.

Alproksimiĝinte al Mario, Pedro prenis ŝian manon, sin apogis sur maŭra balustrado, de kiu la belulino rigardis la riverfluon, kaj denove demandis.

La Tajo-rivero kun ĝemo batadis kontraŭ la piedestalo de l' belvidejo inter la rokoj, sur kiuj altiĝas la ĉefurbo. La suno subiris malantaŭ la ĉirkaŭaj montoj, vespera nebulo leviĝis, kvazaŭ blua gaza vualo, kaj nur la unutona plaŭdo de l' rivero rompadis la majestan trankvilon de l' vespero.

„Ne demandu min, pri kio mi ploras,“ ekkriis Mario, „ne demandu! Mi ja ne povas tion konfesi al vi, kaj vi ne komprenos min! Estas deziroj, kiuj pereu en mia virina animo, ne eldiritaj eĉ per la sopirfrenezaj, fulmosimilaj pensoj, kiujn la lipoj ne kuraĝas esprimi, nekompreneblaj fenomenoj de nia enigma naturo; ilin viro neniam divenos. Mi petegas vin, ne demandu tiel persiste pri la kaŭzo de mia malĝojo. Se mi rakontus al vi vi eble ekridus.“

Kiam eksonis tiuj ĉi vortoj, ŝi denove mallevis la kapon, kaj li denove komencis petegi ŝin.

Fine la belulino interrompis la persistan silenton: „Vi deziras tion ĉi,“ ŝi diris al la amato per obtuza, iom rompita voĉo, „ĉi tiu malsaĝaĵo devigos vin ekrideti; sed tute egale — mi rakontos al vi. Hieraŭ mi estis en la katedralo ĉe preĝeja festo de Dipatrino. Ĉe la ĉefa altaro, sur ora piedestalo blindige brilis ŝia skulptaĵo. La sonoj de l' orgeno tremis, disŝutiĝante per resonoj sub la arkaĵoj de l' preĝejo, kaj en la ĥoro de l' kredantoj sonis »Salve Regina«. Plena de piaj pensoj mi preĝis longe, sed subite nevole mi levis la kapon kaj eksentis, ke la rigardoj sin direktas al la altaro. Mi ne scias, kial miaj rigardoj estis kvazaŭ alforĝitaj al la skulptaĵo, ĝustadire ne al la skulptaĵo mem, sed al objekto, kiun ĝis nun mi ne estis rimarkinta; ĝi neklarigeble altiradis min al si. Ne ridu, tiu objekto estis ora fingroringo, kiu tiel mirige brilas sur mano de Sankta Virgulino subtenanta Kriston-knabeton ... Mi deturnis la okulojn, komencis preĝi ... Forestas fortoj. Ĉiam denove miaj okuloj nevole sin turnis al tiu sama loko. La fajroj de l' altaro mirinde reflektiĝadis en la fingroringo ludante sur la facetoj diamantaj. Multego da fajreroj — ruĝaj kaj bluaj, verdaj kaj siringviolaj — brilegis ĉirkaŭ la juveloj, kvazaŭ ventoturniĝo de fajraj polveroj, kvazaŭ kapturniga ĥororondo de fa'rospiritoj, blindigantaj per brilo kaj mistera moviĝemo. Elirinte el la templo, mi revenis hejmen kun la sama konstanta penso engravurita en mia memoro: Mi kuŝiĝis sed ekdormi mi ne povis ... La nokto pasis — tamen mi turmentiĝis per la unu penso. Nur je tagiĝo fermiĝis miaj palpebroj, kaj, ĉu vi kredos, eĉ en sonĝo mi ekvidis virinon brunvizaĝan; jen ŝi aperadis, jen malaperadis alte levante la oran fingroringon ornamitan per juveloj. Ĉi tiu virino, se efektive ŝi estis virino — similis la Sanktan Virgulinon, kiun mi honoras; sed eĉ sen tio ŝi ŝajnis al mi supertera. Ŝi rigardis min ridante. »Ĉu vi rekonas ĝin?« ŝi ŝajne demandis etendante la fingroringon. Kiel ĝi brilas! Kvazaŭ astro forŝirita de nokta printempa ĉielo. »Ĉu vi rekonas ĝin? Ĝi ja ne estas via kaj neniam, neniam estos via. Vi posedos aliajn — pli belajn, sed tiun ĉi, kiu tiel mirinde brilegas, tiel ĉarme lumradias ... neniam ... neniam ...« Jen mi vekiĝis kun la sama trudema penso, simila same kiel hieraŭ al najlo ardigita per intenco diabla, nesuperebla, sugestiita, sendube, de Satano mem ... Kaj kio do? Vi silentas, vi estas malserena?“

Pedro konvulsie kunpremis la anson de spado, levis la kapon kaj malsonore eldiris:

„Kia virgulino posedas tiun ĉi trezoron?“

„La Virgulino de Sanktejo,“ mallaŭte diris Mario.

„De Sanktejo!“ ripetis Pedro kun terura esprimo. „De Katedrala Sanktejo!“

Kaj en la trajtoj de lia vizaĝo reflektiĝis je momento la stato de lia animo terurtremigita de unu penso.

„Aĥ, kial do alia virgulino ne posedas ĝin?“ li daŭrigis varmege kaj esprimplene; „kial ĝi ne brilas sur episkopa mitro, sur reĝa krono, kial la diablo mem ne tenas ĝin en ungegoj? Tiam mi akirus la fingroringon por vi eĉ per prezo de inferaj turmentoj. Sed ĉe Virgulino de Sanktejo, ĉe nia Sankta Patronino, mi mi toledano ne povas, ne povas!“

„Neniam!“ ekflustris Mario neaŭdeble, „neniam!“ kaj daŭrigis ploregi.

Pedro senmove rigardis la fluon de l' rivero, kiu ondiĝis antaŭ lia konfuzita rigardo, disbatiĝante sur la rokoj, kie altiĝis la ĉefurbo.

III.

Toleda katedralo! Imagu arbareton de altkreskaj palmoj el granito, kiuj kunplektiĝante per branĉoj formas grandegan, mirindan kupolon. Kaj sub ĉi tiu kupolo havas rifuĝejon kaj vivas per tiu vivo, kiun enspiris genio, la tuta mondo, per estaĵoj fantaziaj aŭ realaj

Imagu nekompreneblan ĥaoson de ombroj kaj lumo, en kiu kunfluas, disfluas en krepusko de flankaltaroj, diverskoloraj radioj de ogivaj fenestroj; tie batalas kun la krepusko de l' altaro kaj perdiĝas en ĝi la brilo de lucernoj.

Imagu mondon el ŝtono, senfinan — kiel la spirito de via religio, malluman — kiel ĝiaj legendoj, enigman — kiel ĝiaj paraboloj; kaj tamen, vi ne havos eĉ proksimuman koncepton pri tiu eterna monumento de entuziasmo kaj kredo de niaj antaŭuloj, kiujn centjaroj malavare donacis per trezoro de legendoj, inspiroj kaj de kredo.

En la profundo de tiu mondo vivas senbrueco, majesto, poezio de mistikismo kaj kulta timo, gardantaj la eniron kontraŭ profanaj deziroj kaj malprofundaj pasioj.

Jen ftizo haltas en sia evoluo per enspiro de pura monta aero; ateismo nepre resaniĝos en la atmosfero de l' kredo.

jen lumreklamo por Esperanto en la kasejo de l' urba teatro atentigas nin per du steloj. Entute dek firmoj estas pretaj elpendigi en la montrofenestroj la verdan stelon kun ŝanĝeblaj sciigoj. Krom tio la verda stelo troviĝas ĉe la fenestro en la Esperantujo Kohlenmarkt 5, kiel aukaŭ diversaj Esp. afiŝoj je publikaj konstruaĵoj: impostejo, regna ĉefkasejo ktp.

Same la konstantaj Esp. anguloj ĉiusabataj en „Danziger Volksblatt", libro-ekspozicio en la librejo Boenig, Kohlenmarkt, ornamita per pli ol vivgranda olea pentraĵo de nia Majstro, maturigis bonajn fruktojn. Esperanto estas konata en ĉiuj sociaj klasoj, ĝi mankas nur en la plej altaj klasoj.

En la Danzigan Popolan Altlernejon jam de la jaro 1919 estas enkondukataj konstantaj Esp. kursoj, kiuj sukcesis bone. Nuntempe speciala kurso preparas progresantojn por la unua instruista ekzameno en la liberŝtato Danzig. Kuraĝa paŝo, tamen necesa, ĉar ni danziganoj aspiras en nia ŝtato propran ekzamenantaron por akceli la progreson de Esperanto, ĉar Esperanto apartenas al la lernejo! — Skribe ni petis la Popolan Reprezentantaron de la liberŝtato, Senaton, instruist-unuiĝojn k. a., ke la instruistaro kiel eble plej baldaŭ ekkonu kaj ŝatu la neceson de la internacia lingvo. Ja ni atingis ankoraŭ pli. Sed pri tio buŝe, kiam Esperantistoj multnombre venos al la Dua Danziga Esperanto Kongreso. „Unue Nürnberg, poste Danzig!", la du alihonorindaj lokoj de germana arto kaj kulturo; tio nun estu en la vasta mondo la signalvorto de niaj gesamideanoj. Kuraĝe antaŭen!

Estu kore bonvenantaj en la Libera Urbo Danzig, kiu espereble baldaŭ povos saluti mondkongreson (1925?). *Danzigano.*

Vojo inter rozaj laŭboj en la Lumpe-parko.

Ni ne deziras malamikecon.

Nur nun oni sendis al ni la februaran numeron de „Kataluna Esperantisto" kun ĉefartikolo de la redaktoro s-o *J. Grau Casas*, en kiu li kritikas artikolon aperintan en ET kaj samtempe*) ofendas la personon de nia ĉefredaktoro, eldirante interalie neveran aserton. Ĉiu havas la rajton kritiki la ĵurnalon ET aŭ iun ajn artikolon aperintan en ĝi (kompreneble ankaŭ artikolojn de la ĉefredaktoro), sed oni ne ataku ofende la personon. Ni ne volas detale okupi nin pri la artikolo de s-o Grau Casas, ĉar ni ne ŝatas la personajn polemikojn, kiuj jam tedas nin kaj niajn legantojn. Ni nur konstatas la faktojn kaj petas nian katalunan kolegon estonte skribi pli afere.

*) Ni ne povas diveni pro kia motivo, ĉar niaj ĝisnunaj interrilatoj kun s-o Grau Casas resp. kun niaj katalunaj samideanoj estis ĉiam tre harmoniaj, kaj ni deziras, ke ili restu tiaj.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Aŭstrujo.

Fohnsdorf. — S-o v. Lidl gvidas kurson por la geinstruistaro popollerneja (22 p.); partoprenas direktoro Ister de knablernejo kaj direktorino Demmel de knabinlernejo.

Knittelfeld. — S-o fervoja inspektoro Santler komencis kurson en popollerneja ĉambro. La lerneja servisto lernis Esperanton en Aŭstralio dum mallibereco.

N-o 5 de „Aŭstra Esperanto-Raporto" enhavas vastan kronikon, kiu raportas pri multaj grupfondoj, kursoj ktp. Tio pruvas, ke nia afero bone marŝas en Aŭstrio. Bedaŭrinde estus sencele, se ni represus la raportojn, ĉar ili i lejparte jam malnoviĝis. Ni petas niajn aŭstrajn kaj ĉiulandajn legantojn, bonvole sendi al ni ĉiam nur aktualajn, koncizajn kaj fidindajn raportojn, kiujn ni volonte utiligos por niaj „Mallongaj Sciigoj".

Bulgarujo.

Nova grupo en vilaĝo Karamusal (fondis f-ino Serafima Sakazova). Novaj kursoj en Breznik (gvid. Marin Hristov), Gradnica (gvid. Damjan M. Kruŝev, 25 p.), G. Ĉumaja (gvid. Georgi Stoikov, 25 p.) kaj aliloke.

Francujo.

La grupo de Mulhouse (Mühlhausen) havas 58 anojn. Kurson gvidas s-o Affinger.

Germanujo.

Esperanto-Gruparo Berlin. — En la monata kunveno la 20. marto parolis s-o telegrafdirektoro Behrendt pri la temo: „Sprachliche Streifzüge durch Esperanto," al kiu la multnombraj ĉeestintoj sekvis kun granda intereso kaj poste vigle interdisputis. La 17. aprilo okazos en la hejmo Kurfürsten-strato 11, „Zamenhof-memorvespero". *H. N.*

Esperanto Grupo Potsdam. — La 27. marto okazis en la urba „Charlottenschule" la ekzameno por la gelernantoj el la diversaj popollernejoj, en kiuj dum la lasta jaro Esperanto estas instruita. Proksimume 50 geknaboj montris al la invititaj gepatroj kaj reprezentantoj el la instruistaro kaj la magistrato, ke ili post nur unujara instruado bone lernis la internacian lingvon. S-oj Markau, Krienitz kaj rektoro Helmholtz ekzamenis la infanojn, kiuj vigle kaj kun granda intereso respondis al ĉiuj demandoj rilate al gramatiko, tradukoj kaj interparoloj. Ĉeestis ankaŭ la urba lerneja konsilisto D-ro Ohms, kiu jam praktike okupiĝas pri Esperanto. *H. N.*

Dresden. — La 23. marto la Esp. Kom. Grupo aranĝis monatkunvenon, kiun partoprenis kelkcentoj da gesamideanoj. S-o Krestanoff faris referaton je temo „En la lando de la rozoj", dum kiu li, helpe de bildoj kaj specimenoj, interesplene priskr bis la kulturadon, rikoltadon kaj distiladon de la rozoj. Estis ludata akto de „Hamleto" kaj rakontataj Esp. spritaĵoj.

Novaj kursoj de Germ. Lab. Esp. As. komencis en Silezio: la 28. 3. en Nieder-Salzbrunn, 29. 3. en Waldenburg, 30. 3. en Hermsdorf kaj Friedland; krome du kursoj por infanoj kaj unu ĝenerala kurso la 8. 4. en Reussendorf-Neucraussendorf.

Hispanujo.

IX-aj Internaciaj Floraj Ludoj en Manresa.

Laŭ informo en „Kataluna Esperantisto" de marto la Natura Floro (por la plej bona originala versaĵo kantanta Amon) estas aljuĝita al la verko sub devizo „Muta Larmo" (verkinto nia talenta poeto Julio Baghy en Budapest), kiu bonvolis cedi al la Organiza Komitato de la Kongreso sian rajton elekti Reĝinon de la Festo. Estas elektita kiel reĝino la ĉarma f-ino Paquita Cots Fortuny el Manresa, nevino de la tiea urbkonsilanto s-o Orrit.

Italujo.

Kursoj de s-o Mainardi ĉe Popolaj Universitatoj Milano (30 p.) kaj Musocco (40 p.). Pluaj kursoj en Milano de s-o Russi ĉe Esp. Domo kaj de s-o Piatti. Nova grupo en Musocco kun 35 anoj.

En Torino kurso de s-o Ramolfo por fervojistoj.

En Venezia kurso por oficiroj de la „Genio Lagunari" (15 p.).

Japanujo.

Ĵus atingis nin nova numero de japana revuo kun Esp. subtitolo „La Monopol-Informado". La unue alsendita numero estis por ni enigmo; la dua jam donas iom da klareco: ĝi enhavas dupaĝan Esp. kurson kaj du geografiajn artikolojn en Esperanto. Tamen la adreso de la revuo ankaŭ nun ne estas ekkonebla, eĉ ne la aperloko.

Oceanio.

En Menado sur insulo Celebes pastro Kyftenbelt fondis Esp. Virinan Klubon de ĉinoj, eŭropanoj kaj indiĝenoj kaj donas tri kursojn. Entute tie nun estas 80 ge Esperantistoj.

Rumanujo.

Caransebes (Banato). — Rezulte de la senlacaj klopodoj de s-ano Edmundo Vincze, del. de UEA, la 1. 4. okazis publika prop. kunveno en ĉambrego „Diemer". Post malferma parolado de s-o Vincze pri la neceso de Esperanto, parolis en rumana lingvo s-o Prof. I. Popacurescu. Post tio s-o Vincze klarigis germane kaj hungare la gravecon de Esperanto por unuigi la kulturojn kaj protekti la gepatrajn lingvojn, prezentante ankaŭ la teknikan superecon de Esperanto. La paroladoj vekis en la plenplena ĉambrego entuziasman eĥon, kaj sekvis distrado ĝis noktomezo, en la limoj de modereco. Sekve de la kunveno komenciĝis publika kurso la 3. 4. por hungarlingvanoj. Speciala kurso germanlingva por fervojaj oficistoj komenciĝos la 16. 4. en la stacidomo. Ambaŭ kursojn ĝvidas s-ano Vincze.

Slatina. — La 18-an de marto s-o D-ro F. Iosif kuracisto-kapitano, membro de Esp.-Grupo Bukureŝti, faris bonsukcesan konferencon pri „Lingvoj internaciaj kaj Esperanto", en la „Cercul Cultural Al. Vlahuta". La grandnombra publiko kun multa interesiĝo aŭskultis la historion de la mondlingva problemo; post klarigoj pri la antikvaj perso-arama, greka kaj latina kaj modernaj mondlingvoj, la entuziasme prezentita Esperanto gajnis plenan simpation. La paroladon sekvas kursoj kun 80 partoprenantoj el la tuta inteligentularo de la urbo, inter ili s-o Prof. Paltineanu, prez. de la nomita „Cercul Cultural" (Kultura Rondo).

Tighina (Besarabio). Bonsukcese finiĝis kurso gvidita de s-o D. Grünberg, del. de UEA. Speciala danko estas ŝuldata al s-ino Frima Bauch, afable donita kursejon.

Svisujo.

Bern. — Laŭ la decido de la ĝenerala kunveno de Svisa Esp. Societo en Zürich, okazinta la 10. dec. 1922, la grupoj de Bern, Burgdorf kaj Lyss kune faris, post multaj klopodoj de nia prez. D-ro Spielmann, petskribon al la kantona instrua direkcio por la enkonduko de Esperanto en la lernejoj. Tiu petskribo estas subskribita de multaj eminentuloj, interalie de la direktoroj de kvar internaciaj oficejoj (Poŝt-, Telegraf-, Fervoj- kaj Internacia Pacoficejo) kaj de 12 ekonomiaj societoj kaj industriaj firmoj. (Esp. Grupo Bern.)



Lageto en la Lumpe-Parko.

Eldorado por birdoj.

La protektado de birdoj fariĝis nuntempe necesa tasko. Veran eldoradon por birdoj kreis entuziasma naturamiko, la grandkomercisto Heinrich Lumpe en Aussig (industria urbo en germana Elbe-valo de Ĉeĥoslovakio). Lia natur- kaj birdprotekta parko situas sur la deklivoj de l' Marien-monto inter Aussig kaj Schönpriesen kaj ampleksas areon de kvin hektaroj.

Ĉefa celo de la parko estas la protektado de birdoj; sed ĝi servas ankaŭ por flegado de la enlanda floraro, por sciencaj eksperimentoj je kreskaĵoj, por perfektigo de fruktospecoj ktp. Krome ĝi havas etikan taskon: gajni la koron de la junularo por naturo kaj birdaro. Multaj lernejestroj volonte kondukas siajn lernejanojn al la parko, ekzemple en unu sola monato (junio 1922) viz tis ĝin 22 lernejoj kun 1100 lernantoj. De post ĝia malfermo en la jaro 1908 la parkon vizitis jam pli ol 100 000 personoj. Fine la parko servas al bonfaraj celoj, ĉar la enirmono estas dediĉita al bonfaraj institucioj. Iam sur la loko de l' parko troviĝis ruiniĝinta brikfarejo, dezertaj deklivoj kaj kavaĵoj. Nun tiu sovaĝejo ŝanĝiĝis je vera paradizo, post venko de grandaj malfacilaĵoj kaj senĉesaj klopodoj de ĝia kreinto kaj liaj helpantoj. Naturo kaj arto estas ĉi tie harmonie kunigitaj. Bone flegataj vojoj, alterne kun ŝtonŝtuparoj, kondukas preter multekoloraj floraroj, plantaroj kaj arboj al la plej alta punkto, la akvokastelo „Marienquelle" (Fonto de Mario), kiu — pere de 29 hidrantoj — provizas la parkon kaj la kaskadojn je akvo. La birdaj kantistoj trovas en la parko ĉion, kion ili bezonas: senĝenan okazon por konstrui siajn nestojn, protekton kontraŭ malamikoj kaj dumvintre abundan nutraĵon, kiu konsistas ĉefe el diversaj semaĵoj miksitaj kun „Ceres"grasaĵo kaj kiu estas donata al ili ĉiutage ĉe dekvar nutrejoj.

En la mallonga tempo de l' ekzisto de la parko la birdaro multnombre hejmiĝis en ĝi. Kiom utila ĝi estas, tion pruvas la fakto, ke en la tuta parko kaj en la alapartenantaj frukto- kaj legomo ĝardenoj ne troviĝas raŭpoj.

Certe la bela verko postulis kaj konstante postulas grandan kapitalon; sed — dank' al Dio — ankaŭ en la mallaŭdegata nuntempo ekzistas ankoraŭ malegoistaj, idealaj viroj, por kiuj la mono ne estas plej alta celo, sed nur rimedo por krei bonon kaj belon. Tia viro estas Heinrich Lumpe.

Pro siaj grandaj meritoj s-o Lumpe ricevis multajn laŭdojn kaj honorojn. An-

„Heinrichsburg" (Kastelo de Henriko) kun pli ol cent nestejoj por birdoj kovantaj en kavaĵoj.

Tamen, kiel ajn grandega kaj majesta vidiĝis la katedralo al la okuloj en ĉiu tempo, kiam oni eniras en ĝian misteran, sanktecan ombron, neniam ĝi faras tiel profundan impreson, kiel en tiuj tagoj, kiam la hostiujoj kovriĝas per oro kaj juveloj, sanktegaj altaroj per tapiŝoj, kaj aspergiloj per diverskoloraj ŝtonetoj.

Kiam estas lumigitaj multe da arĝentaj lucernoj, disverŝantaj torentojn da lumo, kiam pendas en la aero nubo el incenso, kaj la voĉoj de l' ĥoro, kaj la harmonio de l' orgenoj, kaj sonoriloj de l' turo tremigas la konstruaĵon de la plej profunda fundamento ĝis la plej alta supro de la turo ĝin kronanta, nur tiam estas komprenata kaj sentata la severa majesto de Dio, kiu en ĝi loĝas, ĝin vivigas per spiro kaj plenigas per reflekto de sia ĉiopovo.

Dum la sama tempo, kiam Pedro renkontis Marion, pri kio oni ĵus rakontis, en la toleda katedralo estis festata la asta tago de la granda semajno de Dipatrino.

La religia soleno kolektis en ĝi sennombran amason da kredantoj; sed ĝi jam disiris el la katedralo ĉiudirekten. Estingiĝis la fajroj de l' kapeloj kaj de la ĉefa altaro, kaj la grandegaj pordoj de l' templo ektondris fermiĝante post la asta toledano, kiam el la krepusko eliĝis viro pala kiel la surtomba skulptaĵo, sur kiu li sin apogis por momento, superante la emocion; poste tre singarde li komencis moviĝi al la krado de krucifikso. Tie la lumo de lucerno permesis distingi liajn vizaĝtraĵtojn.

Tio estis Pedro.

Kio do okazis inter la geamantoj, ke Pedro estis realigonta penson, kies sola apero igis ekstari la harojn sur lia kapo pro teruro. Neniu povis tion scii. Sed li estis en la katedralo por plenumi sian kriman intencon. En lia maltrankvila rigardo, en la tremo de liaj genuoj, en la ŝvito, kiu per grandaj gutoj faladis de lia frunto, estis klare ekkonebla lia penso.

La katedralo estis malplena, absolute malplena kaj dronis en profunda silento. Malgraŭ tio ĉi de tempo al tempo kvazaŭ levigis surda bruo; krakado de ligno, sopiro de vento aŭ (kiu scias?) eble trompo de imago, kiu aŭdas, vidas, perceptas en sia ekscitiĝo tion, kio ne estas. Tamen susurbruo estis jen proksime, jen malproksime; jen post la ŝultroj, jen flanke eksonis kvazaŭ haltigataj ploregoj, la brueto de vesto, obtuza bruo de malkaj alproksimiĝintaj paŝoj.

Streĉante la fortojn Pedro moviĝis antaŭen, aliris al la krado kaj atingis la unuan ŝtupon de la kapelo. Ĉirkaŭ tiu ĉi kapelo altiĝis reĝaj ĉerkujoj; sin apogante per la mano sur la teniloj de l' spadoj, la ŝtonaj skulptaĵoj gardis tage kaj nokte la altaron, en kies ombro ripozis la mortintoj. „Antaŭen!" preskaŭ neaŭdeble ekflustris Pedro, volis ekmoviĝi kaj ne povis: liaj piedoj estis kvazaŭ alnajlitaj al la planko. Li mallevis la okulojn, kaj liaj haroj stariĝis pro teruro: la planko de la kapelo estis kovrita per larĝaj, malgajaj surtombaj plataĵoj. Unu momenton ekŝajnis al li, ke malvarma osta mano lin retenas sur la loko per nesuperebla forto.

Estingiĝantaj lucernoj, kiuj flagretis en la profundo de flankaltaroj, kiel steloj, perdiĝintaj en mallumo, ekbrilis ĉe lia rigardo, lumigis la surtombajn skulptaĵojn kaj altarajn statuojn.

Por momento ekheliĝis la tuta templo kun siaj granitaj arkaĵoj kaj altaj apogseĝoj de l' altara ĥorejo.

„Antaŭen!" denove ekkriis Pedro ekstreme ekscitita pro teruro kaj sin ĵetis al la trono. Surrampante li tuŝetis la piedestalon kun la statuo de Dipatrino. Ĉirkaŭ li ĉio aliformiĝis je fantomaj kaj teruraj konturoj, densiĝis krepusko kaj flagretis duonlumo, multe pli korpremanta ol mallumo.

Kaj la Reĝino Ĉiela, mole lumigata per ora lucerno, ridetis trankvile, difavore kaj serene meze de tia teruro. Sendube ĉi tiu rideto muta kaj senmova, kiu por momento trankviligis Pedron, sugestiis al li fine timon — pli profundan ol tiun, kiun li sentis antaŭe. Intertempe li denove rekonsciiĝis, fermis la okulojn, por ne vidi Dipatrinon, konvulsie etendis la manon kaj forŝiris la fingroringon, pian donacon de iu ĉefepiskopo, egalvaloran je granda riĉaĵo. Jam la altvaloraĵo estis en lia posedo; jam liaj kunigitaj fingroj kunpremis ĝin per eksterordinara forto, restis nur kuri, kuri kun ĝi. Por tio ĉi necese estis malfermi la okulojn, sed Pedro timis ekrigardi la statuon de Dipatrino, la reĝojn de l' surtombaĵoj, la demonojn de l' kornicoj kaj la monstrojn de l' kapiteloj; li ne povis ekrigardi la striojn de l' ombroj kaj la radiojn de la lumo, kiuj simile je blankaj grandegaj fantomoj malrapide fluetis en la profundo de l' flankaltaroj, plenaj de timigaj, nekonataj sonoj.

Fine Pedro malfermis la okulojn, postenrigardis — kaj sovaĝa krio forŝiriĝis de liaj lipoj.

La katedralo estis plena de skulptaĵoj. En longaj ankoraŭ ne viditaj vestoj ili malsuprenriris de siaj niĉoj, plenigante la tutan templon, kaj rigardis Pedron per okuloj sen pupiloj. Sanktuloj, monaĥoj, anĝeloj, demonoj, militistoj, sinjorinoj, paĝioj kaj burĝoj ariĝis kaj miksiĝis en la flankaltaroj kaj en la altaro.

Ĉe la piedoj de Pedro faris meson, en ĉeesto de la reĝoj genuiĝintaj sur la tomboj, marmoraj ĉefepiskopoj, kiujn li vidis antaŭe senmovaj sur iliaj lokoj. La tuta mondo de bestoj kaj rampaĵoj el granito, fantomaj, senformaj, teruraj plimultiĝis, kvazaŭ vermoj el grandega kadavro, alkroĉiĝante je la ŝtonaj plataĵoj, surrampante murapogilojn, kaŝiĝante sub baldakenoj, pendiĝante de arkaĵoj.

Pedro jam ne povis sin movi. La frapado en la tempioj estis terure forta, sanga nubo kovris la okulojn. Jen dua krio — superhoma, korŝirianta, kaj Pedro sen konscio falis sur la altaron.

Kiam matene la preĝejaj servistoj trovis lin ĉe la piedestalo de l' altaro, li ankoraŭ tenis en sia mano la oran fingroringon kaj, ekvidinte la alproksimiĝantajn homojn, ekkriis per surdiga rido: „La ŝia! La ŝia!" La malfeliĉulo freneziĝis.

El hispana lingvo tradukis *S. Persival.*

La fondo de Nürnberg.

Laŭ la legendo.

Ĉirkau la 50-a jaro post la naskiĝo de Kristo venis la bofilo de l' imperiestro Aŭgusto, la militistestro Tiberio (laŭ aliaj tio estis Drusus Nero), kun armeo en ebenan regionon inter la riveroj Schwarzach (Ŝvarcah), Schonbach (Ŝonbaĥ) kaj Rednitz (Rednic). La vintro jam estis sendinta siajn anoncantojn, kaj Tiberio devis serĉi dumvintrajn bivakojn. La regiono ŝajnis al li taŭga; ĝi prezentis bonan sensalan akvon, amason da ĉasaĵo kaj sufiĉegan lignaĵon. Krom tio meze el la sabla ebenaĵo leviĝis roka monto. Li do stariĝis siajn tendojn inter la monto kaj la rivero Pegnitz (Pegnic), kaj sur la roko li konstruigis per siaj militistoj gardoturon kun kvin anguloj „kiel rifuĝejon kaj gardejon" kaj nomis ĝin „Neronis specula" (Gardejo de Nero). Ankaŭ aliloke li konstruigis dum la vintro ĉiuspecajn fortikaĵojn, por okupi siajn legiojn. Sed kiam venis la printempo, li forlasis la negasteman regionon kaj turnis sin al la Danubo. Post lia formarŝo restis forta garnizono kun legiestro. Ties ĉeesto baldaŭ allogis ĉiuspecan popolon, kiu konstruis al

taŭ nelonge la Botanika Instituto de la Wiena Universitato nomis novan plantospecon „Carum Lumpeanum“. Sed Lumpe tute ne estas fiera; li restis simpla, modesta homo. Lia sola ambicio konsistas en ĉiam pli laŭcela perfektigo de la parko kaj en kaŝita bonfaro.

Kelkaj bildoj, afable disponigitaj al ni de s-o Lumpe pere de lia frato Otto Lumpe en Trautenau (kiu estas fervora Esperantisto), donu al niaj legantoj imagon pri la beleco de la Lumpe-parko, kiun oni prave nomas „eldorado por birdoj“.

Al niaj abonantoj kaj amikoj en Nederlando.

Ĉar nia abonejo por Nederlando ne plu estas ĉe s-o Ravestein, provizore la kasisto de la Ned. Esperant. Ver. „La Estonto Estas Nia“ (LEEN), s-o Rutgers en Haarlem (v. Hogendorpstr. 9) funkcias kiel nia agento por Nederlando. Niaj amikoj tial bonvolu pagi sian abonmonon al s-o Rutgers.

Ni estas traktantaj kun la estraro de LEEN pri rabatita prezo de ET por la membroj de LEEN kaj esperas baldaŭ veni al bona rezultato, kontentiganta ambaŭ flankojn. Tamen, kiu nun abonas por la nuna prezo, ne malprofitos, ĉar ni tuj post faro de kontrakto plilongigos la abonojn de la LEEN-anoj laŭ la rabato, pri kiu ni interkonsentos kun la estraro de LEEN.

LEEN jam dissendis en ĉi tiu afero cirkuleron al siaj membroj. Kiu hazarde ne ricevis tiun cirkuleron, bonvolu peti ĝin de s-o Rutgers.

Ĉar la nova interkonsento multe helpos ne nur nin, sed ankaŭ LEEN-on, ni petas ke abonantoj, kies abono finiĝis aŭ baldaŭ finiĝos, rapide reabonu kaj klopodu varbi laŭeble multajn novajn abonantojn por ET.

Administraciode ET.

Dumvintra pejzaĝo el la Lumpe-Parko.

Oficialaj Sciigoj de I. S. A.

La kvaronjara eliro de nia „Int. Scienca Revuo“ devigas nin komuniki al la Esperantistaro urĝajn novaĵojn per „Esperanto Triumfonta“.

Al ĉiuj malbonvalutanoj.

La terura senvaloriĝo de la germ. marko kaj rilate al tio la pli intensa plikariĝo de ĉiuj prezoj por papero kaj presado estigis malbonan situacion por Int. Scienca Asocio kaj precipe por la eldonejo de nia „Int. Sc. Revuo“.

Kiam ni konsideras la fakton, ke pro teknikaj kaŭzoj la agada jaro estas plilongigita ĝis la Nürnberg'a Kongreso (do la pagitaj kotizoj validas ĝis fino de julio 1923), ni esperas certe, ke ĉiuj pagintaj malbonvalutanoj de 1922, kies kotizoj estas nuntempe plialtigitaj, volonte cedos al ni libervolan aldonpagon!

Ĉiuj pagintoj de 1922 estas per tio petataj, minimume aldonpagi libervole la diferencon inter la iam pagita mono kaj la nun validaj kotizoj. Nur ekstreme malbona situacio financa permesas sinliberigon de tiu morala devo!

Ni proponas jenajn detalaĵojn:

1. Ĉiuj anoj el la landoj aŭstra estona, litova, latva, turka, rusa, hungara kaj pola kaj plue ĉiuj germanoj, kiuj validas kiel unuopaj membroj (estas tiuj, kiuj ricevis membronumeron legeblan en la Revuo!) pagu rekte al s-o *Dr. Döhler*, Riesa, Germani. (aŭ per letero reg., aŭ per ĝiro al Scienca Esperanto-Oficejo, Gemeinde-Giro n-o 1505, Riesa, aŭ per poŝtĉeko al Dr. Walter Döhler, Riesa, Postscheckkonto Dresden Nr. 115 754).

2. Ĉiuj korporaciaj membroj per D. Wiss. Esp. Ges. (ne nur la abonantoj de la Revuo!) pagu la aldonon al *Prof. Dr. Göhl*, Neugeradorf i. Sa. (Konto Dr. Göhl bei Allg. D. Creditanstalt Neugeradorf i. Sa., Postscheckkonto 795 Dresden; tiu estas la konto de la Creditanstalt!)

3. Ĉiuj korporaciaj membroj per E. V. D. L. (membroj sen kaj kun Revuo pagu la aldonon al s-o Franz Thiel, Weidentalstr. 20 Dresden 29 (Postscheckkonto 755, Dresden; Gemeinde Giro 4651, Dresden).

Atentu: Ne pagu al la kasisto Dr. Arnhold; notu bone la celon de via sendo; nuraj abonantoj pagu al la eldonejo!



Ekirejo al „Heinrichsburg“ kaj al la akvokastelo.

si kabanojn ĉirkaŭ la tendaro de la romanoj kaj serĉis sian profiton de la fremduloj. Laŭ la gardoturo la loko estis nomata Neronesberg (Monto de Nero).

La Neronesberg'anoj vivis tre neordan liberan vivon, kaj la surŝosea rabado fariĝis ilia ĉefa „negoco“. Per tio ili fariĝis maltimemaj, kuraĝegaj kaj militemaj; vaste ĉirkaŭe ili estis timataj.

Dum la furiozoj de la popolmigradoj loko kaj kastelo estis okupataj de la frankoj; ĉi tiuj konstruis sur la roko domon al sia idolo. La loko pligrandiĝis kaj jam estis ĉirkaŭita per bonaj muroj; pro tio, kiam Attila alfuriozis kun siaj sovaĝaj bandoj, multaj loĝantoj de la antikva Norikumo fugis en la urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon. Sed la bastiono pruviĝis tro malforta. La „skurĝo de Dio“ (Attila) okupis la urbon, prirabis kaj kruele detruis ĝin.

Laŭ la foriro de Attila tamen la urbo ekfloris eĉ pli forte, dank' al la klopodoj de la nove alvenintaj loĝantoj. Laŭ ili la urbo nomiĝis „Der Noriker Berg“ (La Norika Monto). De ĉiuj direktoj venis aliĝantoj. En la arbaroj eksonis hakilo kaj pioĉo de la koloniistoj, kaj la plugilo trafosegis la arbaran grundon. La tuta ĉirkaŭaĵo koloniiĝis je dissemitaj kabanoj, kies loĝantoj vivis per ĉasado, abelbredado kaj karbigado. La apostolo de la germanoj, Bonifacio, gajnis ilin por la kristaneco, baptis ilin ĉe la fn. „Reuter-puteto“ kaj konstruis por ili ĉe la pi do de la monta roko kapelon, kiun li dediĉis al S-ta Petro (en la jaro 725).

Al sendintoj de neliteraturaj artikoloj.

Por eviti superfluajn korespondaĵojn, ni de nun sciigos ankaŭ pri nia intenco publikigi aŭ ne publikigi neliteraturajn manuskriptojn. Sendante manuskriptojn, oni do ne aldonu respond-kuponon aŭ poŝtmarkon.

Ni intencas publikigi:

Siciliaj vidindaĵoj.
Elektra trenado fervoja en Italio.
Conrad Veidt kaj la filmo kiel projekcio de arto.
La interna ideo.
Bankistoj decidu!
Mosa banko.
Interesa konvertiĝo.
Nova propaganda vojo.
Esperantida propagando.
Signoj de Morse.
Memhelpo.
Temperaturo ĝis 20 000° en laboratorio.
La kriminalmuzeo en Dresden.
Orienta marbanejo Zoppot.
Postkursa devo de l' instruanto.
Esperanto, la sola tutmondo lingvo en jaro 1950.
Pri eldono de bildabumoj.
Pri internacia „kodo“ Esperanta.
Ne ĉiu povas esti „eminentulo“

Ni intencas ne publikigi:

Konsideroj pri kreo de tuteŭropa respubliko.
Vasil Levski. (Tro longa.)
10 devoj por Esperantisto).
„Ni inter popoloj la murojn detruos“. (La artikolo estas taŭga, sed sendita pseŭdonime.)
Kial multaj homoj ne lernas Esperanton?
Pri gazetara demando, de H. J. en W. (Jam ne aktuala.)

Komerco.

Internacia Esperanta Komerca Oficejo de Foiroj kaj Ekspozicioj

estas fondita en Paris (67, Rue Saint-Lazare) de s-o Léon Méras. La oficejo publikigos en la konata dumonata revuo „France-Europe-Orient“ sub rubriko „Internacia Esperanta Komerco“ informojn pri komerco, industrio, turismo kaj terkulturo, en du lingvoj: franca kaj Esperanta.

Scienco.

Arheologiaj trovaĵoj en Bulgario.

Ĉiutage oni legas pri la famaj riĉaĵoj de la faraono Tutankhamen, de la tuta mondo oni rapidas al Egipto por vidi la malkovritajn trezorojn. Ĉe ni, en Bulgario, kvankam malofte, kelkafoje troviĝas tiaj monumentoj, pri kiuj multaj envius al ni eksterlande. En nia tero estas solvotaj ankoraŭ multaj sciencaj problemoj, precipe pri la prahistoria kulturo. Antaŭ nelonge en vilaĝo Mogilovo (apud Stara Zagora, Sudbulgario) estas farita rimarkinda arheologia eltrovaĵo. Speciale grava pri la trakia kulturo pro siaj artaj indecoj kaj bonega konserveco, la trovaĵo estas valora akiraĵo por la bulgara scienco.

Je distanco de 15-20 metroj unu apud alia estas trovitaj la metalaj partoj de du militĉaroj. Flankenlasante multajn ferajn partojn ni devas atentigi pri la bronzaj ornamaĵoj de la ĉaroj.

Busto de Heraklo, 30 cm. alta, kun ŝildo en la dekstra mano, levita al la ŝultro, en la maldekstra tenanta batalpilkojn kaj surkape havante leonfelon.



Lumpe-Parko: Florantaj fruktarboj apud la akvokastelo.

Statueto de mortigita batalanto, sur piedestalo 24 cm. longa; la ĉevalo kaŭranta sur siaj postaj piedoj, la antaŭaj duonfleksitaj, la kapo elstaranta time kun malfermita buŝo, rektigitaj oreloj, densa kolhararo. Sur la ĉevalo sidas militanto, klininta sian korpon malantaŭen, en senviva pozo. Lia kapo estas klinita flanken, la dekstra mano malsuprenlasita, kaj en ĝi troviĝas dutranĉa hakilo. Longaj haroj falas sur liajn ŝultrojn. La dekstra ŝultro estas nuda. Lia frigia ĉapo kaj la tuniko estas belega laboraĵo.

Du aliaj statuetoj (16 cm.) kun longaj haroj; du bustoj, barbara tipo kaj multaj aliaj malgrandaj bronzaj ornamaĵoj.

Ĉiuj ĉi trovaĵoj montras al ni, kiom ni povas atendi ĉe estontaj fosadoj pli grandaj, precipe en la multnombraj artefaritaj montetoj, dissemitaj en Trakio.

Komunikis: *Iv. H. Kr-off.*

Internacia Sporto.

Naĝado.

La sveda majstronaĝisto Arne Borg venkis en Paris la francajn konkursantojn.

Piedpilko

En Ĉeĥoslovakio dum Pasko: Slavia kaj Sparta (kombinita trupo) kontraŭ Karlsruher F. C. 4 : 1; Sparta Praha - Boldklubben Köbenhavn du ludoj: 3 : 0 kaj 3 : 3; D. F. C.—Rapid Wien 2 : 3; Teplitz—Karlsruhe 3 : 1; Karlsbad - Würzburger Kikkers 2 : 7; Karlsbad—Karlsruhe 1 : 3.

En Svislando dum Pasko: Zürich—Wacker München 3 : 2; F. C. Basel—1860 München 1 : 1; Nordstern Basel—1860 München 0 : 2.

En Hungarujo la 8. 4.: La ludo de la urbaj trupoj Budapest kaj Berlin en Budapest finiĝis per venko de la berlina trupo 0 : 1.

La Rugby-trupo de Oxford venkis la germanan majstron S. C. 1880 Frankfurt 26 : 0.

Teniso.

Ĉe la germana halo-teniso en Bremen restis majstroj: en la sinjora solludo la antaŭjara majstro Rahe (Rostock) per 6 : 4, 6 : 1, 9 : 7 kontraŭ Moldenhauer (Berlin); en la sinjorina solludo la sveda majstrino s-ino Fick per 6 : 4, 4 : 6, 7 : 5 kontraŭ la antaŭjara majstrino Galvaro; en la sinjora duopa ludo la paro Demasius-Dominic.

Gimnastikaj ludoj.

Gimnastiko celas favori normalan plifortigon de la organoj, celas lukti kontraŭ malbonaj higienaj cirkonstancoj, en kiuj oni vivas, kaj difini la ekvilibron inter fizikaj kaj mensaj aktivecoj. Gimnastiko donas, fine, fizikajn fortojn en okazoj de praktika utileco, dum bezonoj kaj eventualoj de l' vivo.

Ni havas ekzercojn, kiuj koncernas la organojn de l' spirado kaj de l' cirkulado, kaj ekzercojn, kiuj rigardas sole muskolojn efikantaj movadon. La unuaj estas nomataj naturaj (marŝo, kuro, salto, grimpo, naĝo, eskkursoj ktp.); la duaj estas nomataj artefaritaj kaj celas ekskluzive la evoluigon de muskola forto.

Konsiderante, ke homoj fortaj ne ĉiam estas sanaj, ĉar saneco ne dependas de la muskola forto, sed de regula funkciado de la organoj, kaj konsiderante la pruvon, ke oni venkas malsanojn, ekzemple la gripon, per rezisto de la organoj kaj per la energio de vivecaj funkcioj sed ne per muskola forto, la higieno postulas, ke gimnastiko devas esti konstituita de naturaj ekzercoj kaj ke oni devas komenci artefaritajn ekzercojn de la 16-a jaro.

Ni konstatas, ke gimnastiko havas kompletan higienan efikon, se ĝi estas farata volonte.

Inter multaj ekzercoj junuloj plej ŝatas ludojn, ĉar ludoj kontentigas la bezonon de spontana movado sentatan post senmoveco en lernejo, ĉar ili refreŝigas la lacan cerbon, kontentigas la sentojn de libereco, de propra amo kaj de vetcelado, kaj fine ĉar ili produktas ĝeneralan bonfarton, kiun ne donas aliaj ekzercoj.

Certe ludoj, kaŭzoj de grandaj avantaĝoj, povas alporti ankaŭ iujn domaĝojn de morala ordo. Ekzemple: dum ludoj oni toleras egoismon, trouzon de forto, arogantecon, provokojn, malbontraktojn inter junuloj; ludoj kreskigas antipatiojn, malamikecojn kaj brutajn luktojn. Tiujn malbonajn rezultojn ni ne povus eviti, se la junularo estus lasata en libervolo de sia sensperto kaj de siaj kapricoj, kaj se edukistoj ne havus aŭtoritatecon. Male, la sperto instruas, ke ludoj havas grandan valoron, se edukistoj povas antaŭvidi malfacilecojn de ĉiaj situacioj kaj kunordigi siajn kapablojn por atingi venkon.

Kiaj estas la plej taŭgaj ludoj por atingi bonan rezulton? Mi provos alian fojon memorigi la ĉefajn al ĝentilaj gelegantoj.

D-ro Vito De Benedetto,
Del. de UEA en Lecce, Italujo.

Filatelio.

Usono.

Nuntempe oni eldonas novan serion de usonaj poŝtmarkoj. Ĝis hodiaŭ de la nova serio estas eldonataj:

1 cd. Franklin	6 cd. Garfield	15 cd Statue of Liberty
2 cd. Washington	9 cd. Jefferson	25 cd. Niagara
3 cd. Lincoln	10 cd. Monroe	50 cd. Arlington Amphitheatre
4 cd. Martha Washington	11 cd. Hayes	1 dol. Lincoln Memorial
5 cd. Roosevelt		10 cd. Special Delivery

Sur markoj de l' antaŭa serio troviĝas nur du bildoj, t. e. Franklin, unua estro de poŝta departemento, kaj Washinghton, unua prezidanto de Usono. Sur markoj de serio 1923 troviĝas tiom da bildoj kiom da markoj. *E. L. S.*

Leterkesto de ET.

R. I. Cl. en Chicago. — Dankon por via letero de 15. 3. Pri la lasta punkto vi plej bone turnu vin al nia itala abonejo aŭ al iu itala del. de UEA. Ni mem ne estas informitaj.

Nekrologo.

Risto M. Popoviĉ Ĉupiĉ en Montenegro.

Jen elspiris lastfoje ankoraŭ unu el niaj malnovaj samideanoj, maloftaj precipe en tiu terangulo, konata verkisto kaj homamanto. Komence instruisto, poste pastro en sia naskurbo Danilovgrad, li translokiĝis post la mondmilito al Cetinje, kie li okupis postenon en la konsistorio. Dum sia vivo li verkis poeziaĵojn, prozaĵojn kaj literaturajn artikolojn por multaj serblingvaj gazetoj, kaj kolekto de liaj verkaĵoj aperis en du belaj volumetoj tre laŭdataj de liaj samlandanoj. De liaj rakontoj aperis en Esperanto nur du: „Tre bone“ kaj „La medalo“, pitoreskaj priskriboj de la montenegra instruista kaj popola vivo. Kun Esperanto li konatiĝis sufiĉe frue kaj vigle propagandis ĝian fraŭgan ideon. Interalie li estis kelkajn jarojn delegito de UEA en Danilovgrad. La anonco pri lia morto venis al mi, kiel malnova lia korespondanto, de la cetinja poŝtoficejo.

Pacon al lia cindro, kaj koresprimon de dolorsento al lia familio!

Iv. H. Kr-off.

* * *

En Orŝova (Rumanujo) mortis malnova samideano s-o katol. pastro Petro Römer, en aĝo de 49 jaroj. Longedaŭra malsano lastatempe lin malhelpis partopreni en la movado. Antaŭe li estis en Szeged (Hungarl.); tieaj samideanoj lin rememoros. La mortinto estis multe ŝatata kiel pastro kaj kiel homo.

Diversaĵoj.

Forigo de vizoj kaj pasportoj.

Laŭ Daily Mail de 13. 3. la vizo sur pasportoj de britaj civitanoj vojaĝontaj al Italujo estas forigita. Pasportaj vizoj por britujanoj jam estas forigitaj de franca, hispana, nederlanda, bulgara kaj svisa registaroj.

Laŭ la sama ĵurnalo de 26. 3. la Brita Ĉambro (Konsilantaro) de Komerco unuanime decidis prezenti rezolucion insiste petontan al la brita registaro, ke ĝi forigu pasportojn por vojaĝontoj inter Francujo kaj Britujo.

Multmiljara ganto.

Dum la esplorado de la objektoj, trovitaj en antaŭĉambro de l' tombo de la egipta reĝo Tut-Ankh-Amen kaj nun ĥemie prilaboritaj de fakuloj, oni faris strangan malkovron. La ekspertoj Lucas kaj Mace trovis ĉe la malplenigo de ujo, en kiu estis konservita reĝa mantelo, ganton. Ĝi estas la unua egipta ganto, ĝis nun trovita, kaj ĝi estas kelkajn milojn da jaroj pli malnova ol ĉiu alia ganto, kiujn oni ĝis nun trovis en la mondo. La nun malkovrita ekzemplero konsistas el bela, delikata teksaĵo kaj laŭŝajne estis portita de la reĝo, kiam li estis ankoraŭ infano trijara. Sur la ujo, en kiu ĝi troviĝis, estas videblaj miniaturbildoj, kiuj prezentas ĉasscenojn. La miniaturoj estas purigitaj kaj refreŝigitaj de Lucas kaj Mace; la koloroj nun denove havas sian jam pasintan brilon.

Joh. Bernhard.

Gazetaro.

Hungaraj gazetoj.

En marto oni nombris pli ol 50 artikolojn pri Venezia, Nürnberg, Esperanto Press, Petőfi-festo ktp. La gazetoj, kiuj publikigis artikolojn pri aŭ per Esperanto, estas en Budapest: L' Echo de Danube, Pester Lloyd, Pesti Napló, Magyarország, Budapesti Hirlap, Vilag kaj Az Ujság; en Kaposvar: Somogyi Ujság; en Pécs: Pécsi Lapok; en Miskolcz: Miskolczi Napló kaj Magyar Jövö.

Alilandaj gazetoj.

Il Mattino, Napoli, 2. 4. Sub „Komerca vivo, Formia“ pri Venezia Konferenco.
Republica, Lisboa, 16. 3. Pri Venezia.
Obchodni Obzor, Brno, 2. 3. Kvar art. pri Esp. — 9. 3. Spertoj de foiroj pri Esp.
Moravsko-Slezsky Denik, Mor. Ostrava, 5. 3. Franca Akademio rekomendas Esp.
Ostravsky Denik, Mor. Ostrava, 6. 3. Du art. pri Esp.
Auerbacher Zeitung, Auerbach, 30. 3. Int. Lab. Oficejo kaj Esp.

Preseraroj en la „Revuo“.

En parto de la eldonnombro de la aprila „Revuo“ troviĝas kelkaj preseraroj: pĝ. 1, subskribo de la ilustraĵo, legu „Monumento“ (anst. „Momento“); pĝ 1, maldekstre, lin. 17 legu „interamikiĝo“ (anst. „interamakiĝo“); pĝ. 4, dekstre, piednoto, legu „mantelo“ (anst. „manklo“).

Parolejo.

164. Rilatas al 143.

Mi vidas en la „Vortaro de la Oficialaj Radikoj" de la Akademio, ke la nomoj de la nacianoj havas grandajn komencliterojn. Tio estas bona, ĉar tiaj ne estas ofte etnologiaj sed komparindaj al familii- aŭ patro-nomoj. Tiamaniere oni diferencigas por la okulo: Bostono, bostono; Est(on)o, esto; Finnlanda, fina (La Fina Batalado); Lap(on)o, lapo; Malto, malto; Romano, romano; Senegala, senegela. Mi aprobas la Anglan regulon, ke, se la substantivo indas grandan literon, ĝia adjektivo meritas samon. Pro mala kutimo mi ofte serĉis adjektivon vane en leksikono, kiam mi devis serĉi ĝin en geografia indekso aŭ biografia. Ĉe nacia lingvo povas esti motivo, nome, diferenciĝi adjektivon kaj substantivon, sed tio estas farata en Esperanto sone. Vidu ankaŭ en „La Transskribo de la propraj nomoj", oficiala raporto de G. Moch, p. 61. Oni skribu: „Mi parolas Esperante, esperante ke oni komprenos min!", sed pli bona por la orelo: „en Esperanto". Mi skribas la pronomon „Vi(n)" ĉiam per granda V, nur por legebleco kaj por eviti eraran skribon, pro nezorgo, de „ni" aŭ „mi". *Ch.-O. St.-M.*, London.

165. Internaciigo de l' tempo.

Estis necese, ke la Esperantistoj kreu al si propran monsistemon, la Sm.-on. Per tio ni posedas propran valoron, al kiu oni povas rilatigi ĉiujn aliajn. Nur tiamaniere estas eble trakti pri prezoj diversanaciaj. Sed por internacia lingvo tio ne sufiĉas. Tre mankas ankoraŭ la internaciigo de l' tempo. Unu parto de ĉi tiu jam estas efektivigita en kelkaj landoj per la dudekkvarhora taga tempo, tiel ke noktomezo estas nomata nulo, kaj post ĉirkaŭiro de la horloĝmontrilo estas la dudekkvara. Ĝi estas vere internacia nombrado, de ĉiuj samideanoj komprenata. Mankas nur la decido, ke ĉiuj ĝin uzu. La dua parto de la internaciigo de l' tempo koncernas la kalendaron. Internacia kompreniĝo ne estas ebla, antaŭ ol la Esperantistaro ne havos tian propran internacian kalendaron al kiu ĉiuj povos rilatigi sian nacian. Kiamaniere interkompreniĝu katolikoj, ortodoksoj, turkoj, japanoj ktp. havantaj ĉiuj alian kalendaron? Estas necese ĝeneraligi la nombradon de jaroj kaj la tagojn de l' jaro. Tio absolute ne ofendus la religian sentadon de diversaj kreduloj, ĉar ĉiu konservus sian propran kalendaron en la interna vivo, sed Esperantistoj, uzantaj nian lingvon en rilatoj al alinacianoj kaj alikonfesianoj, posedus specialan kalendaron, uzeblan tiel, kiel oni uzas propran nomon. Sen internacia temponombrado ne povas ekzisti internacia kompreniĝo.

Kompetentaj Esperantistoj estas do petataj interkonsiliĝi kun kalendarofakuloj, por ke ĉi tiu grava problemo povu esti kiel eble plej baldaŭ realigebla.

D-ro Moriz Topolansky,
Meteorologia Instituto en Wien.

166. Konsilo al ET-abonantoj.

La sciigoj pri denova plialtiĝo de la ET-aj abonprezoj por malbonvalutaj landoj ne malmulte ĉagrenas la tieajn samideanojn. Kaj vere, la situacio devigas al tio, ke oni malpliigu la elspezojn por ajoj ne nepre bezonataj, kaj al ĉi tiuj oni ja kalkulas Esperantojurnalon. Ĉu ni do rezignu je nia „semajna", al kiu ni tiom alkutimiĝis? —

Ho ne; auskultu kiel ni aranĝas la daŭrigon de la abono al ET. Ĉiu el la ĝisnunaj abonintoj de ET serĉis en la grupo du aŭ tri gesamideanojn, kiuj jam volonte estus lerninta ET-an, sed ne povis pagi la plenan abonprezon. Li nun abonas unu ekzempleron de ET kune kun la 2—3 amikoj, el kiuj ĉiu pagas trionon aŭ kvaronon de la abonprezo kaj povas tiel kunlegi la ĵurnalon. Nun ni ne bezonas malaboni, ĉiu el ni pagas nur parton de la abonprezo, kaj la ĵurnalo estas legata de pli multaj gesamideanoj ol antaŭe.

Ĉu vi provos fari same? *Leono Funken*, Koblenz.

167. Komparado de lingvoj kun Esperanto.

Ĉis nun, la Esperanta ge- estas ekzempligita nur per germana Geschwister (gefratoj) sed kial ne por diverseco Gesinde, Gespielen, Gevattern, el sama lingvo, aŭ el nederlanda getuigen (gestestantoj), genooten (gekamarado) kun ĝiaj kunmetitaĵoj; aŭ aveda Gemälen, se mi povas fidi al leksikonoj? *Ch.-O. St.-M)* London.

168. La alta poŝttarifo.

Kial ne uzi klubajn leterojn? Kluba letero estus letero afrankita el la kluba kotizo kaj enhavanta leterojn de multaj klubanoj. Oni povus lotumi pri la vico, se necese. Kiel reklamilon oni povus uzi la aerpoŝton kaj Esp. sigelojn. *Ch.-O. St.-Menteth*, London.

Recenzejo.

LIBROJ.

TAGLIBRO DE VILAĜ-PEDELO. De St. St. Blicher. Tradukita de H. J. Bulthuis, L. K. Rekomendita de E. L. A. 48 pĝ. 12:19 cm. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg (Germ.) 1922. Prezo 0,75 mk.×ŝlosilnombro, por bonvalutuloj 0,75 svis fk.

En la formo de taglibro la verkinto enkondukas nin en pastrodomon, en kiu ni sentas la spiriton de l' kristana amo. Li rakontas al ni la sorton de la membroj de ĉi tiu domo kaj speciale la travivaĵojn de knabo edukata de la vilaĝa pastro. La tempo de l' komenco de la 18-a jarcento estas priskribata al ni, la spiro de simpla pieco, kiun ni hodiaŭ malofte renkontas, tuŝas niajn korojn tiel, ke ni formetas la libron kun granda kontenteco. Tre agrable la enhavo kontrastas al la modernaj kaj superanta modernaj verkoj. Ankaŭ la stilo estas modela, kaj la malgranda libro — kelkajn malkorektaĵojn la leganto mem rimarkos — povas esti rekomendata al ĉiu deziranta ĝui trankvilan horon ne ĝenate de la bruego de l' tago. Per ĉi tiu libreto nia Esperanta literaturo pliriĉiĝis je valora dana klasikaĵo. *F. J.*

SÜDSLAVIEN, Königreich der Serben, Kroaten und Slovenen. (Sudslavio, reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj.) Eldonita de Messamt (Foiroficejo) Frankfurt. 92 pĝ. karton. Prezo 1.25 svis. fk, por malbonvalutuloj 2500 gmk.

Vere salutinda broŝuro germanlingva de la publicisto Hermann Wendel. Ĝi aperas kiel 10-a volumo de la eldonaĵoj de l' Foiroficejo Frankfurt kaj enhavas interesajn artikolojn pri geografio, historio, kulturo, ekonomio ktp. de Sudslavio, verkitajn parte de eminentaj sudslavoj mem, parte de germanaj loĝantoj de Sudslavio. Celo de la broŝuro estas konatigi germanojn kun la cirkonstancoj de la plej granda kaj plej forta najbara nacio en la sudo kaj per tio akceli interproksimiĝon de la du nacioj.

EL LA LANDO DE RUINOJ. De Antoni Wyslouch. Tradukis Salo Grenkamp-Kornfeld. Unua parto. 18 pĝ. broŝur. Prezo 0.25 svis. fk., por malbonvalutuloj 500 gmk. Eldonejo Oskar Ziegler, Deisenhofen bei München, Germ.

La enhavon konsistigas tri poeziaplenaj skizoj: „La dezerto", „Super la maro" kaj „La aglo kaj la suno", kiujn mi legis kun granda plezuro, ĉar ili estas laŭ mia persona gusto. La traduko de tiaj verketoj ne estas facila, kaj la tradukinto ne tute sukcesis en sia laboro. La pleonasmon de l' originalo li devis en Esperanto pli bone kompreneblig per laŭcela metado de la frazoj, vortoj kaj interpunkcioj. Kelkaj eraretoj ne multe ĝenas. La libreton oni povas rekomendi al perfektaj Esperantistoj, sed malpli al komencantoj. *R-ano.*

ACADEMIA PRO INTERLINGUA. Broŝuro pri historio kaj statutoj de la Akademio, pri reguloj, vortaro, ortografio kaj gramatiko de Interlingua, historio de lingvo internacia.

STARPTAUSTIKA VALODA. Lingvo internacia. Pec Tautu Savienibas oficialiem dokumentiem sastādījis, K. Strazde. — Izdevusi Rigas Esperanto Biedriba. Maksa 10 santimi.

LA FIANĈINIĜO DE SOVAĜULINETO. Triakta komedieto. Originale verkita de Roksano, L K. Dua eldono. 48 pĝ. broŝur. Prezo 3 kč. Esp. eldonejo „Marto", Haida, Ĉsl.

La titolo jam skizas la enhavon: ĝi estas facila komedieto, neniel grava sed amuza kaj bone komprenebla. La stilo estas flua kaj laŭfundamenta. Kelkaj eraretoj: kun sub brako paperujon (anst. paperulo); krom paĉio (anst. escep'e); ŝi turnigas sin (anst. turnas). Nekutimaj vortoj: aperitivo, agacita. — La bezono de dua eldono estas pruvo, ke la verketo plaĉis. Oni povas deziri, ke ankaŭ la nova eldono baldaŭ disvendiĝu. *R-ano.*

GAZETOJ.

Holanda Esperantisto, 29. 3.
Informa Bulteno de Orientfranca Federacio, marto.
Novaj Tempoj, aprilo.
La Espero, febr. kaj marto.
Po'a Esperantisto, febr.-marto.
Ukraina Stelo, aprilo. Adreso: Ivan Ĉepyha, Stanislavov, str. Lypova 76, Orienta Galicio.
La Semisto, jan.-febr.
Aŭstra Esperanto-Raporto, n-o 3.
Marto, marto. Kun interesa artikolo pri „La kuracado laŭ Schroth en Niederlindewiese".
Espero Teozofia, jan.-febr.
La Progreso, marto.
Esperanto Praktiko, marto.
Hungara Esperantisto, marto.
La Suda Kruco, jan.
Svenska Arbetar-Esperantisten, marto.
Esperanta Finnlando, jan.-febr.
Konkordo, jan. kaj febr.
Holanda Esperantisto, 22. 3.
Le Monde Espérantiste, jan.-febr.
L'Espérantis'e Révolutionnaire, marto.

Mi vokas vin per la fajfsignalo

Vivu Esperanto

Marŝo Esperantista de *A. Menzel.*

Eldonoj: Por citro gmk. 360.—, svis. fr. 0.50, Fortepiano gmk. 600.— svis. fr. 0.80, Fortepiano kaj violono gmk. 720.—, svis. fr. 1.—, malgranda orkestro gmk. 1200.—, svis. fr. 1.75, granda orkestro gmk. 1500.—, svis. fr. 2.25, ĉiu orkestroparto gmk. 120.—, svis. fr. 0.20. Por eksterlando bonvaluta svis. fr. Por Germanujo kaj samvalutaj landoj validas la supre cititaj prezoj laŭ germana valoro multobligataj per la ŝlosilnombro, kiu estas nuntempe: 700. Sendkostoj 10 %. Mendu ĉe:

G. Menzel, Leipzig-Gohlis, Menckestrasse 41, Germ.

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO,
51, rue de Clichy, Paris.

Eldonejo de la

Verkoj de D-ro L. L. Zamenhof

kiujn ĉiu Esperantisto devas legi.

Ĉefaj verkoj aĉeteblaj:

Fundamenta Krestomatio, entenanta la „Ekzercaro"-n (el la „Fundamento de Esperanto"), „Fabloj kaj Rakontoj"-n, „Artikoloj pri Esperanto"-n, „Poezioj"-n. Unu dika libro 460-paĝa . . Franc. Frankoj 8 —

Georgo Dandin, komedio en tri aktoj de Molière. Unu libro grandformata . . . . . 2.—

Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare. Unu libro mezformata . . . . . 3.—

Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe. Unu libro grandformata . . . . . 6.—

Proverbaro Esperanta, laŭ la verko „Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de M. F. Zamenhof (1232 proverboj). Unu libro grandformata . . . . 3.—

La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller. Unu libro grandformata . . . . . 4.—

La Revizoro, komedio en kvin aktoj de N.V. Gogol. Unu libro grandformata . . 4.—

Verkoj baldaŭ aperontaj aŭ reaperontaj:

Fabloj de Andersen. Plena kolekto. Unua libro grandformata . . . . . —.—

Marta, rakonto de Eliza Orzeszko. Unu libro grandformata . . . . . —.—

La Rabeno de Bahara, romano de H. Heine. **La Gimnaziano,** monologo de Ŝalom Alajhem. Unu libro grandformata . . . . . —.—

Lingvaj Respondoj aperintaj en „La Revuo". Unu libro grandformata . . —.—

Oni aldonu al la prezoj, plie por la sendkostoj: 15% + 0,25 fk. en Francujo; 20% + 0,75 fk. en aliaj landoj.

Gvidilo tra Bialystok,
la nask-urbo de nia Majstro.
32 paĝoj, kun 6 ilustraĵoj.

Prezo: bonvalutuloj 0.30 svis. fk.,
malbonvalutuloj 0,30 gmk. × ŝlosilnombro,
ET-abonantoj la prezo de unu ET-numero (pagon ni prenos laŭdezire de la abonkonto).

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta" (T. & H. Jung)
Horrem bei Köln.

Ni liveras nur librojn de ni mem eldonitajn. Pro aliaj verkoj sin turni al Butin & Jung en Godesberg.

Mi regon kaŭzas la verketo ĝis nun nepresita

Knaboj aŭ knabinoj? Laŭ la volo de la gepatroj.

Ĝi pruvas la eblecon de laŭvola seksa destino, bazita je la rezultatoj de sciencaj esploroj. Distingitaj, facile kompreneblaj gravaj klarigoj por ĉiu kieruło, same grava ankaŭ por bestbredistoj kaj ekonomoj. Tuj havebla kontraŭ antaŭpago de 1 sv. fk. aŭ egalvaloro. Malbonvalutuloj demandu prezon ĉe la liveranto P. Kutter, Zittau i. Sa. (Germ.) Rosenstr. 5 B m.

Oni postulu la „Victoria"-Eksport-prezliston

en germana-hispana aŭ germana-angla lingvoj.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof

Inda memorlibro, presita sur luksa papero, kun multaj ilustraĵoj laŭ originalaj fotoj. Nepre havinda komplemento al la libro de D-ro Privat: La vivo de Zamenhof.

Prezoj: por malbonvalut. 1750 gmk.
por bonvalut. 0,85 fk. aŭ egalvaloro.

Taglibro de Vilaĝpedelo

Interesa romansimila rakonto de la dana verkisto Blicher. Tradukita de s-ano Bulthuis, LK-ano. Rekomendita de ELA.

Prezoj: por malbonvalut. 1875 gmk.
por bonvalut. 0,90 svis. fk. aŭ egalvaloro.

Oni ridas

Bela kolekto de veraj perloj de bonhumoro kaj sprito. De s-ano Rieck. Rekomendita de ELA kaj reviziita de Zanoni, literatura redaktoro de ET.

Prezoj: por malbonvalut. 2500 gmk.
por bonvalut. 1.25 svis. fk. aŭ egalvaloro.

Por sendkostoj oni aldonu 10% al la supre nomitaj prezoj.

Butin & Jung, Godesberg (Germanujo)
Esperanto-eldonejo, Bahnhofstr. 50
Poŝtĉeka konto Köln 920 56.

Granda novaĵo.

Elektra suno!

Plej oportuna varmigforno, pura, agrabla, ĉiam preta!

Vendado per Esperanto Komercista Grupo, Dresden-N., Hauptstrasse 38.

„Speton"-gard-rimedo, grava por virinoj! Tavoletaro Mk. 100 + sendkostoj.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto" (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 28420.
Brazila: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgara: Georgi Ar. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Liuuigo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 2, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Itala: Itala Esperantista Federacio, Casella Postale 25, Verona.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latva: Talivaldo Indra, Riga, Pasta kaste 475.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaŭnas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125) — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordecklego 1 a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esp.-Centro Rumana, Bucuresti, Alea Suter, 19.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de CentraKomitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkesto n-o 650.
Sveda: Föreningsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
Svisa: Esp. Librejo „Verda Stelo", Rosenheimstr. 5, St. Gallen-Ost.
U. Ŝ. A.: The Esperanto Service Corporation, Box 52, Weehawken N

NEDERLANDA ANONIMA SOCIETO

LUKSA-PANO FABRIKOJ

ANTAŬE HENRI J. CARELS.

50 BUTIKOJ: DEN HAAG, HAARLEM, AMSTERDAM.

LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHARWÄCHTER.)

DEN HAAG, 63 WEIMARSTRAAT. ONI PAROLAS ESPERANTON.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume 2 sinsekvaj enpresoj) kostas po 2 enpresoj kaj po 20 vortoj (krom u n u adreso): la prezon de
6 ET-numeroj por la landoj Aŭstra, Bulgara, Estona, Germana, Hungara, Jugoslava, Latva, Litova Pola, Rumana kaj Rusa;
5 ET-numeroj por la landoj Belga, Ĉeĥoslovaka, Finna, Franca, Itala kaj Portugala;
4 ET-numeroj por ĉiuj aliaj landoj.

La pagon ni prenas de la abonkonto. Germanaj poŝtabonantoj pagu 3000 mk. Neabonantoj antaŭpagu egalvaloron de 2 svisaj frankoj aŭ 8 stamp. respond-kuponojn. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikiĝo.

GEEDZIĜO. S-ino Selma Thieme—Moerner el Dresden kaj Ilmari Manner, instruisto el Laihia (Finnl.) geedziĝis 27. III. 23 en Helsinki. Ceremonio en Esperanto. Familia lingvo Esperanto.

LETERVESPERON aranĝos finnlanda laborista Esp. soc. „Unueco" la 5-an de majo. Samideanoj ĉiulandaj sendu leterojn kaj poŝtkartojn al s-o Mäenpää, Eläintarhantie 1 pr. B. en Helsinki (Finnl.) [2

GESAMIDEANOJ! Bonvolu noti ŝanĝon de mia adreso. James A. Meagher, nun en Templemore, Co. Tipperary (Irlando). [2

GELABORISTOJ — GEIDEALISTOJ kiuj jam petis broŝuron „Koopereco en Efiko" informiĝu, ke pro multaj diversaj demandoj, pri kiuj tiu broŝuro ne sufiĉe kontentigus legantojn, mi preparis „La Pordego al Libereco" kiu respondas al ĉiuj el la jam ricevitaj demandoj kaj tial estas pli dezirinda al la petantoj. Mi dankas al vi pro via pacienco kaj esperas ke la prokrasto plene kompencos vin, Tamen, se vi ne ricevis „La Pordego al Libereco" vi scias, ke aŭ via adreso estis nelegebla aŭ la respondo perdiĝis en la poŝtservo. Tiukaze vi bonvolu ripeti per nedubebla adreso la atenditan broŝuron. — E. A. Young, en Balboa Heights, Canal Zone, Panama.

FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn sialandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ ivert 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP. str. Vallori 14 en Palma de Mallorca (Hisp.) [16

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Leopold Neubauer en Wien XIII/4 Hackingerstr. 59, interŝanĝas il. pk. kaj pm. [2

Georg Muxeneder en Salzburg (Aŭstr) Christian-Doplerstr. 10 deziras korespondi kaj interŝanĝi pk. il. bfl., papermonon kaj pm. Kun ĉiuj landoj. [2

17-jara lernanto serĉas gekorespondantojn, precipe vizitontojn al la III-a Rumenlanda Esp.-kongreso. Skribu al B. Lebidinski en Cernaŭti (Rumanujo) str. Română No. 45 b. [2

10 laboristoj, partoprenintaj dumvintran kurson, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj per il. pk. Adresu al s o Daniel Hedenström, Postfack 27 en Grycksbo (Sved.). [2

S-o Ludoviko Heimlich, str. Berzsenyi 8 en Kaposvár (Hung.) deziras korespondi kun la tuta mondo. [2

S-o Kazimierz Mieduniecki, teknikisto de aerŝipoj, ul sw. Trojcy nr. 18 en Bydgoszcz (Pol.) deziras interŝanĝi pm. kun seriozaj kolektantoj, il. pk. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [2

F-ino Gertrud Stortz, stud. en Oels/Schles. Kaiserstr. 10 a (Germ) korespondas pri sciencaj temoj, interŝanĝas pk. pm. let. fotografaĵojn, artobjektojn, librojn. [2

F ino Anneliese Ulbert en Neufra a. D. (Württ. Germ.) deziras korespondi per pk. il. kaj leteroj. Interŝanĝas Esp. gazetojn. [2

S-o Kurt Zieschang en Neu-Arnsdorf n-o 45, P. Wilthen i. Sa. (Germ.) deziras korespondi per pk. il. kaj interŝanĝas pm. kun gesamideanoj de la tuta mondo. [2

D-ro J. M. van Stipriaan Luïscius, advokato en 's-Gravenhage (Nederlando) deziras ricevi kartojn kun tribunalo por sia kolekto, kaj resendas alian karton kun bildo. [2

S-o Adolfo Vaníček, en Solnice (Ĉeĥosl.) interŝanĝas pm., il. pk. kaj Esp. glumarkojn kun ĉiulandanoj. [2

Fraŭlo K. Klaps en Danzig, Karpfenseigen 10 II, deziras interŝanĝi il. pk. pm. kaj leterojn. Ĉeftemoj religio kaj laborista movado. Kolektas ĉiajn Esperantaĵojn; rekompencas per mono aŭ io dezirata. [2

Vincenz Müllöhner en Trautenau (Ĉeĥosl.) deziras interŝanĝi il pk. kaj pm. kun la tuta mondo. [3

Karl Schwarz, instr. stud. en Schladming, Stirio (Aŭstr.) deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per pk il. Mi petas legeblan adreson. [1

Ge-Esperantista grupo deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj (il. pk. aŭ letere). — „Antaŭen", Cercle Polyglotte, Hotel Ravenstein, rue Ravenstein, en Bruxelles (Belg.). [3

F-inoj Ester Turunen kaj Helvi Turunen en Viipuri, Pietarink. 5 interŝanĝas il. pk. kun Balkanŝtatoj kaj kun ekstereŭropanoj. [2

S-o Joh. Kauppi, Kruunu haank. 1 en Helsinki (Finnl.) deziras korespondadi per let. kaj il. pk. kun ĉiuj landoj. Ankaŭ interŝanĝas fotografaĵojn. [2

F-ino Julia de Jaegher, Markt 1 en Lokeren (Belg.) deziras interŝanĝi pm. kun ĉiulandanoj. [2

S-o Adhémar Caplau, studento, ŝtata instruist-lernejo, Ledeganckstraat, Gent (Belg), deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [3

S-o Chas J. Bradley, 18 Elgie Av. Armandale, Melbourne, (Aŭstral.), deziras korespondi kaj interŝanĝi pm., pk. kaj gazetojn. [3

F-ino Germaine Vrijdaghs; Oude Koornmarkt 75, Antwerpen (Belg.) deziras korespondi per il. pk., let., pm. [2

S-o Adolf Leskinen, en Viipuri, Kelkkala, Kulppakatu 5 (Finnl.) korespondas letere kaj per il. pk. Interŝanĝas ankaŭ fotografaĵojn. [2

S-o Nikolo Péterfy en Arad (Rum.). Piata Imperatul Trian 1, deziras Korespondi pri spiritismo, teozofio, stenografio kaj ŝako. [1

Kontraŭ 100—200 pm. sendas samkvanton da hungaraj kaj rumanaj Gabrielo Daly en Cluj (Rumanujo), Strada, Mikes Kelemen 7. [1

Kontraŭ 100—200 pm. sendas samkvanton da rumanaj Andreo Felvinczy en Cluj (Rum.) Strada Regina Maria 42 II. Interŝanĝas ankaŭ monon. [1

Samuelo Samuel en Cluj (Rum.) „Foresta" interŝanĝas pk. il. pri urboj kaj popolkostumoj kun ekstereŭropanoj. Havas grandan kvanton da rumanaj pm. [1

Fervora samideaninio (19-jara) deziras, por perfektiĝi en Esperanto, korespondadon kun ĉiaj gelandanoj. Ankaŭ interŝanĝas pm. Hanni Bahr en Oels/Schles. (Germ.) Kaiserstr. 1 d per Frau Krug. [1

Mi deziras korespondadon kun rusoj, precipe en Sudruslando, ĉefe pri rusa literaturo kaj la tieaj cirkonstancoj. Alfred Meyer-Kirstin en Nürnberg, Rathenauplatz 10 III. [2

Gesinjoroj Anna Kasaminskaja el Poltavo kaj Simono Prezent el Kiev finanĉiĝis. [1

S-o Willi Wellepp, juna instruisto en Kötschau b. Merseburg (Germ.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun alilandaj gesamideanoj pri diversaj temoj (arto, pentrado, konstruada arto) precipe pri maŭra konstruadstilo, naturo, popolkutimoj kaj popolkostimoj. Interŝanĝas ankaŭ pm. (laŭ Katalogo Michel). [1

S-o Ewald Lippmann en Kötschau No. 60 b. Merseburg (Germ.) deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun aliaj landoj. [1

S-o Eckard en Kötschau b. Merseburg (Germ.) deziras korespondi kun aliaj landoj per il. pk. kaj l. (precipe pri politiko, vilaĝaj moroj kaj kutimoj). [1

S-o Arthur Meyer en Witzschersdorf 29 b. Merseburg (Germ.) deziras korespondi kun aliaj landoj per il. pk. kaj l. [1

Filatelistoj! Kiu sendas al mi 50—100 diversajn poŝtmarkojn de sia lando, al tiu mi sendos samkvanton da ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj. S-o Josefo Fafek ŝtaba kapitano de 4a ĉs. rajdregimento, en Klatovy, Deflinovastr. 201 (Ĉeĥosl.). [2

Filatelistoj! Jozef Lantos en Kaposvar, Erzsébetstr. 4 (Hung.) sendas 50 diversajn nedifektitajn, belegajn markojn por 5 Kr. č. 1 sv. Fr. 2 fr. aŭ belg. Fr. 1/2 hol. Guld. Monon rekomendite! [1

Gerhard Tamm en Salzwedel, Neuperverstr. 15 (Germ.) deziras korespondi per il pk. kaj let. ĉiuteme. Mi interŝanĝas pm. moneretojn, memoraĵojn ktp. kun ĉiuj landoj. [2

S-o Torao Seo, Yamazato, Yarai 3, Ushigome, Tokio (Jap.) deziras korespondi kaj interŝanĝi pk. il., pm. aŭ gazetojn. [2

S-o Yasuo Kanagawa, Imabuku, Wakayama-ŝi, Japanujo deziras korespondi kaj interŝanĝi vidaĵkartojn, pm. aŭ gazetojn kun ĉiuj landoj [2

Levi Booch, 15 Hardshaw Str., St. Helens, Lancashire (Angl.) deziras korespondi per pk. kaj l. kun gesamideanoj el la tuta mondo. [1

S o Bernhard Schlecht en Kötschau b. Merseburg (Germ.) deziras korespondi kun aliaj landoj per il. pk. kaj l. [1

Bazilo Averin, en Astraĥanj, (Rusl.) Poŝtkesto 14, interŝanĝas poŝtmarkojn, papermonon ktp. Viajn leterojn paku fortike! Sendu (rekomendite) poŝtmarkalbumojn kaj katalogojn (precipe novajn) kaj skribu kiom da sovjetaj pm. al vi sendi. [1